# PACO

OFICIALA ORGANO DE MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO

N-o. 15-16. Ĉ E Ĥ O S L O V A K A  E L D O N O Marto-aprilo 1955

---

## NOKTIĜIS SUPER EŬROPO

Super Gerrıanio jen regis nokto tuj post la ekbrulo de la germana parlamento, nomata Reichstag, Hitler kaj Goering, la anstataŭintoj de ĝeneralo Hindenburg volis regi la tutan mondon, ekstermi ĉiujn negermanajn popolojn kaj antaŭ ĉio la Judojn. Ĉe la lastaj li preskaŭ sukcesis, ĉar li eĉ ĉiujn juddevenajn infanojn ekstermis. Miloj da bonaj Germanoj kaj progresemaj homoj devige migris en koncentrejojn kaj gastejojn, kiujn ili antaŭe mem devis sub la terura komando de "SS"- soldatoj konstrui, suferinte teruran malsaton kaj amase mortinte en la marĉoj de Esterwege, Dachau k. alie.

Kiam tiuj friponoj sukcesis sen ia ajn fremda interveno fari sian "ordon" en la propra lando, tiam ili iris pluen al la aliaj: Saar, Aŭstrio kaj la Sudetoj fariĝis iliaj unuaj viktimoj. La tiam "ankaŭ demokrataj" registaroj de Anglio, Francio kaj Usono, trankvile toleris la murdadon de siaj najbaroj, neatentinte iliajn helpvokojn. Finfine ili mem fariĝis la viktinoj dë la "infano, kiun ili naskis", krom Usono. Kaj hodiaŭ ŝajnas, ke minacas ripetiĝo de la sama spektaklo. Jam la usonaj generaloj transdonis al la iamaj "SS"g-eneraloj la atom-armilojn kaj permesas, ho ne - ili eĉ rekomendas kaj subtenas ĉiamaniere ili, por ke ili firme preparu sin por la "venonta milito".

Ĉu ne estas stranga? - registaro, kiu ĝis antaŭ nelonge kuraĝis aserti, ke ĝiaj armeoj liberigis Eŭropon de la faŝismo, nun mem per ĉiuj fortoj klopodas revivigi ĝin helpe de "SS"-generaloj?

Ĉu ili ne plu memoras la devizojn de la germanaj Nazi-generaloj, kiuj ankoraŭ hodiaŭ post pli ol 10 jaroj sonas en niaj oreloj?: "Siegreich wollen wir Engeland schlagen!" ("Venke ni volas Anglion faligi!"), la kantojn, karikaturojn ktp. pri usonaj "Plutokratoj"? Ĉu ili jam forgesis la nomon "Herrenvolk" (Sinjora popolo)?, kiun ili al si donis freneze mokinte ĉiujn aliajn popolojn inkluzive ties registarojn kaj prezidantojn? Hitler profetis, ke fine estos nek venkintoj, nek venkitoj, ĉar la venkintoj poste batalos inter si. Kaj preskaŭ tiel estas! Sed Hitler eble mem ne estus kredinta, ke post apenaŭ 10 jara paŭzo liaj malnovaj venkitaj generaloj ricevos atomarmilojn mem de la venkintoj, por farigi iliaj bravaj kunuloj.

Mi plene komprenas la tragedion de la germana popolo, kiun ĝi nun travivas. Sed ne eblas opinii, ke por la malnovaj metodoj estas atingebla ia plibonigo. Vi povas nur fariĝi nova "Kanonenfutter" (manĝaĵo por kanonoj), sed per paca maniero kaj internaciaj traktadoj eblas atingi pli bonan vivon ankaŭ por vi, Germanoj. Ne lasu vin

forlogi denove al pereigo! Ne kredu la fanfaronajn allogajn promesojn de novaj milit-instigantoj. Ili havis bonegan okazon ekstermi la al ili timigan bolŝevismon, kiam la Hitler-armeoj staris antaŭ Moskvo kaj Leningrado, kiam Sovjetio ankoraŭ estis sola, sed ili ne kuraĝis ataki ĝin, Kaj imagu nun Sovjetion kun ĉiuj Popoldemokratioj kaj Ĉinio! Tio estas fortoj centoble plimalfacile venkeblaj, kaj kontraŭ tiaj fortoj oni volas starigi vin! Se viaj generaloj fidas je la atombomboj, kiujn ili ricevis, poste ne forgesu, ke ankaŭ je la alia flanko oni majstras ilin kaj fine ni ja povas perei ĉiuj, se ni ne sukcesos konservi nian homan prudenton!

Rudolf BURDA

## C O V E N T R Y   R E S P O N D A S

Nia angla k-do Ronald LYNN, kiu peris kaj tradukis leterojn de solidarecesprimoj al la decidoj de la urbkonsilantaro en Coventry, senditajn de la Esp-pacrondo el Plzeň kaj Virina Komitato el Děčín (Ĉeĥosl.) ricevis jenan respondon:

„Permesu min diri kiel sincere ni en Coventry valorigas la komunikaĵojn de simpatio kaj kuraĝigeco el ili. Eble ili jam scias ke grupo de ses homoj, enhavanta la urbestron, iris al Stalingrad lastan novembron (el nia urbkonsilantaro), por verki komunan alvokon al la Unuiĝintaj Nacioj Organizaĵo por la malpermeso de la atoma kaj hidrogema bombo kaj aliaj armiloj de amasa detruado. -

Nia misio estis tute sukcesa. Mi ĝojas povi diri, ke ni estas invitantaj ses reprezentantojn de Stalingrad viziti Coventry, ĉar ni opinias, ke tio estas unu el la plej bonaj metodoj por instigi internacian amikecon inter la popoloj.

Bonvolu transdoni al la Esperantista Pacgrupo en Plzeň kaj al la Virina Komitato en Děčín, kiel sincere ni estimas iliajn subtenajn leterojn. Samtempe mi diras ke mi klopodos, ke la konsilantaro respondu oficiale; kvankam tio eble daŭros pli ol monaton.

Dume bonvolu akcepti miajn sincerajn respektojn kaj bondezirojn.

Via
Sidney STRINGER"

## POR LA GERMANA MILITARISMO KONTRAKTOJ EGALAS PAPERAĈON.

La aŭtoroj de la parizaj kontraktoj klopodas kredigi la naciojn, ke la germanan militarismon oni povas kateni per iaj garantioj. Sed la nunaj militaristoj celas la samon, kion celis la finacmagnatoj kaj la grandbienuloj el la tempo de la imperiestro Wilhelmo II. kaj Adolf Hitler. Tion atestas la fakto, ke jura ekspertizisto por internacia juro ĉe la registaro de Adenauer estas profesoro Kaufmann, kiu jam en la jaro 1911. skribis en faka libro:

"Sociala idealo estas venka milito, ĉar en ĝi evidentiĝas la vera celo de ŝtato. La rajto de ŝtato estas tiel granda, kiel granda estas ĝia potenco por povi efektivigi sian propran volon. En konflikto de la ŝtata volo devas tial - se ne sufiĉas minaco - decidi perforto, kiu pravas. La milito do ne finigas la juran staton, sed estas en la internacia juro ununura laste ebla pruvo de rajto. - El tio ankaŭ konsekvencas la sole ĝusta traktado pri substanco de internaciaj kontraktoj. -La kontraktoj ĉesas esti validaj, se la ŝtato, kiu celas ilian nuligon, fariĝas sufiĉe forta por liberiĝi de ili."

Sekve la plej efika garantio kontraŭ ĉiu minaco kaj precipe kontraŭ la germana

militarismo, povas esti nur tutforta klopodo ne allasi ĝian refortiĝon.

Laŭ RUDÉ PRÁVO komp.
M. BARTOVSKÁ -MÍSTEK

## GLORO AL ELSIE SILVER

Ekstrakto el la 13a ĉapitro el la romano de Louis GOLDING:

. . . . irante 20 ĝis 30 metrojn malsupren la straton Maleski ŝi (Elsie) ekaŭdis akran ekkrion tre proksime apud ŝi. Ŝi turnis sin kaj ekvidis kiel "SS"-ano trenas post si virinon, tenante ŝin je la haroj. La virino ree ekkriegis. La viro returnis sin kaj bataĉis ŝin per la pugno al la buŝo. La virino neplu aŭdiĝis. Alia "SS"-ano staris apude. Li tenis en la mano infaneton, kiu versimile apartenis al la virino. Li tenis ĝin antaŭ si, kvazaŭ li volus pritaksi la pezon de bovaĵpeco en viandfoiro. Ŝi konsciiĝis, ke ŝi ĉion, tion observis ne de sur la strato, kie ŝi arikaŭ estis antaŭ momento, sed el la interno de malgranda trapasejo, unu aŭ du ŝtupojn sub la nivelo de la strato. Kelkajn sekundojn pliposte alvenis tria "SS"-ano al tiuj du sur la trotuaro. Laŭ lia kontenta aspekto en la vizaĝo oni povis konkludi ke verŝajne li estas serĉinta en la ĉirkaŭaĵo palison fere pentumitan, kiun, kiun li tenis en la mano. Li ŝajne iom embarasiĝis, poste li starigis la palison sur la pavimon, kvazaŭ li volus enpuŝi ĝin teren. Sed li ne faris tion. La "SS"-ano kiu tenis la infanon, levis ĝin alte supren, renkontĵetis ĝin al la paliso kaj trapikis ĝin tiel, ke kelkaj decimetroj de la ferpinto elstaris super la infana korpeto. En tiu ĉi momento la tuta problemo - se temis entute iam pri problemo - estis solvita en la menso de Elsie. Terure blindiga blanka lumo estiĝis en ŝi. Ĉio do estis vero, ĉio vero, ĉio vera pri trajnoj de morto, pri ekstermigaj koncentrejoj, pri gaskameroj, pri Treblinka kaj Maidanek. +/

Ŝi saltegis el la trapasejo al la "SS"-grupo. Ŝi kriegis, sputis, gratis ilin je la okuloj. "It's true!" ŝi kriis angle. "It's true! It's true!"/*ĝi estas vera!/

Sed antaŭ ol la viroj revekiĝis el sia komenca konsterniĝo, alia, plijuna virino kun juna viro elsaltis el ie proksime kaj fortiris ŝin en malhelan, mallarĝan koridoron.

"Vi malinda frenezulino!" riproĉis ŝin la juna virino. Tiu ĉi parolis ruse. "Ĉu vi estas senprudenta?"

Mi elektis tiujn ĉi vortojn el la romano de angla verkisto por refreŝigi en la memoro de la homaro la teruron kaj la bestecon de naziistoj, kiujn revivigas la militinstigantoj opiniante, ke novaj "SS"-anoj konkeros la mondon por ilia bonfarto! Ne, neniam ree iu rajtas instigi kelkajn aĉeteblajn fihomojn al murdado! Ĉu vi do ree aŭdas la vekriojn de milionoj da viktimoj de la antaŭ nelonge pasinta militaĉo? Ĉu tiuj vekrioj kaj ĝemoj ne vekos vian konsciencon por laŭtege kaj plen-energie krii: Neniam plu militon! NENIAM PLU!!!

Inĝ. Jar. ŘEBÍČEK
Uher. Brod, ČSR.

Klarigoj, +/
"SS"-anoj = plejkruela speco de Hitler-soldatoj.
Treblinka kaj Maidanek = famaj turmentejoj /malliberejoj/
Naziisto = germ. faŝista soldato.
kaj ankaŭ civitane.

## AL LA ESPERANTO-JUNULARO KAJ CETERAJ ESPERANTISTOJ

De la 30a julio ĝis la 14a de aŭgusto 1955 okaziĝos en Varsovio la 5a Festivalo de Tutmonda Demokrata Junularo. Oni atendas partoprenon de ĉ. 50.000 gejunulojn el 60-70 landoj kaj kelkcent mil gejunulojn el Polio. Verŝajne inter la eksterlandaj partoprenantoj troviĝos ankaŭ multaj esperantistoj. Tial estas necese, ke ĉiu partoprenonto eĉ nepartoprenonto en la festivalo, skribu al sia landa fest. komitato petante okazigon de Esperanto kunveno en la kadro de la festivalo kaj rekomendu ankaŭ uzadon de Esperanto.

Skribu ĉiuj, junaj kaj maljunaj, al la ORGANIZA KOMITATO de V. FESTIVALO DE LA DEMOKRATA JUNULARO, Mokotovska 3, WARSZAWA, Polio, kaj postulu akcepton de Esperanto kaj organizon de esperantista kunveno en Varsovio.

Memoru, ke nun estas la favora ŝanco helpi al nia movado ne nur en la lando de la kreinto de Esperanto, sed en ĉiuj popoldemokratioj. Viaj multnombraj skribaĵoj atestos pri la forto de la Esperanto-movado! Ekagu!

Pri ĉiu via ago informu se eble per kopioj la ASOCION DE ESPERANTISTOJ EN POLLANDO, Marszalkowska 81, WARSZAWA, Polio. Al ĝi nepre ankaŭ anoncu vian partoprenon.

BERTIT Englund
Boásvägen II, BOFORS, Svedio.
Ankaŭ kun mi bonvolu kontakti
.

## KIEL AGADAS LA FINLANDA PAC-KOMITATO

Precipe tiun demandon oni ofte prezentis al mi dum mia liber-tempa vojaĝo tra la skandinaviaj landoj, Svedio kaj Danlando, kie mi loĝis ĉe tieaj pacamikoj. Mi promesis al ili, kiam mi revenos hejmen, respondi skribe kaj tial mi raportas pri nia Okcid. Finnlanda Packonsilantaro en urbo Turku kaj ties komitatoj:

Nia landa pacmovado estas organizata en 17 distriktoj de provincaj packonsilantaroj. La nia, en Turku, konsistas el 100 packomitatoj. Ilia agado etendas je vilaĝoj, fabrikoj, aŭ aliaj laborejoj, en diversaj urbpartoj kaj popolorganizoj. La packonsilantaro planas por siaj komitatoj diversajn kunvenojn kaj konferencojn. Dum vintro ili okazigas preskaŭ monate. Ilin partoprenas reprezentantoj (delegitoj) de ĉiuj komitatoj. Eminentaj gvidantoj el nia ĉefurbo en tiuj kunvenoj ĉiam prelegas. Sekvas diskutoj pri aktualaj pacproblemoj de diversaj lokoj. Ekzemple estro de nia urbteatro prelegis pri sia vojaĝo al Sovjetio, kien lin sendis pacamikoj. Mi mem prelegis pri mia porpaca vojaĝo tra la skandinaviaj landoj.

Kelkfoje la Packonsilantaro aranĝis amasan tutprovincan konferencon, kiun partoprenis multaj personoj el plejdiversaj popoltavoloj. Laste paroladis prof. Felix IVERSEN, kiu estas ricevinta la Stalin-pacpremion. Kiel honora gato ĉeestis ankaŭ la prezidanto de la leningrada packomitato, ing. Kovalev. La lastan konferencon atingis salut-leteroj el pli ol 10 landoj. La murojn ornamis fotoj kaj pac-afiŝoj el aliaj landoj, kiujn prizorgis nia Esp-packomitato Pere de ĝi la Packonsilantaro ankaŭ dum la lastaj jaroj korespondas kun pacamikoj kaj komitatoj el multaj landoj.

Kiam nia packonsilantaro pasintjare aranĝis ekskurson -la unuan, kiun niaj pacanıikoj aranĝis – al Stockholmo, kiun partoprenis al pacaktivuloj, la kontakton inter ambaŭ urboj aranĝis nia Esp-packomitato.

Jen la plejgravaj okazintaĵoj el nia pacmovado. Necesas ankoraŭ mencii, ke ĝiaj anoj disvastigas ĝian ofic. organon, nomatan "HODIAŬ". La komitatoj ankaŭ aranĝas lokajn kunvenojn, precipe okaze de aktualaĵoj, kiel ekzemple estis la bombado de Bikini, packongresoj kaj aliaj. La komitatoj elektas delegitojn al kongresoj kaj konferencoj, kolektas necesan vojaĝmonon kaj post la reveno, la delegitoj raportas en la lokaj kunvenoj. Kiam mi memoras mian vojaĝon al eksterlanda kaj miajn konversaciojn kun la tieaj pacamikoj pere de Esperanto, mi opinias, ke tiu ĉi raporto povas multe kontribui al imito de internacia interamikiĝo ankaŭ al k-doj en aliaj landoj.

Niilo KAVENIUS
red. en TURKU.

## ĈEĤOSLOVAKAJ KURACISTOJ KONTRAŬ LA ATOM- KAJ HIDROGENBOMBO

Gazeto de ĉeĥosl. kuracistoj intencas printempe, okaze de 1a 10-jara datreveno de la atomesplodo en Hiroŝima kaj Nagasaki, rememori tiun ĉi katastrofon. Por tiu celo kuracista fakulo, kiu estis komisiita kolekti la materialon, petis ĉe ni detalajn raportojn pri la efiko de la eksplodoj, la atommalsano, opiniojn da unuaj fakuloj, fotojn, broŝurojn ktp. La materialoj estu ne nur pri Hiroŝima, sed ankau pri Nagasaki k. speciale pri Bikini. Prefereta estas materialo, kiu ankoraŭ ne estis publikigita en anglaj kaj usonaj gazetoj.

Tiu ĉi entrepreno grave kontribuos al Esperanto kaj la paco.

La materialojn ni post eluzo, resendos al vi. Sendu ĉion al: K-do Zdeněk ŠKVRNA, Dvořákova 7, OSTRAVA I. Ĉeĥoslovakio.

Tiu ĉi alvoko koncernas ne nur japanajn gek-dojn, sed k-dojn el ĉiuj landoj, kiuj eble jam taŭgan materialon posedas, ke ili ĝin al ni pruntu por tiu celo.

## ALVOKO DE VERKISTOJ

Ni verkistoj opinias, ke estas nekredeble, ke nia civilizacio kapablus transvivi novan militon. Ni kredas, ke malsamaj politikaj kaj ekonomiaj sistemoj povas apude kunvivi sur bazo de pace intertraktitaj aranĝoj. Kiel verkistoj ni deziras pacon kaj per nia laboro ni klopodos ĝin atingi kaj ni solene promesas antaŭenigi internacian konsenton per paca traktado. Ni kondamnas verkadon, kiu havas tendencon pliakrigi la jam ekzistantajn danĝerojn kaj malamon. Kiel subskribintoj ni ne asociiĝas al ia politika movado, partio aŭ eklezio, sed sole koncentriĝas por malhelpi tendencojn, kondukantajn, al milito.

Tiun ĉi proklamon subskribis 700 britaj kaj eksterlandaj verkistoj.

MEM-tradukservo
O. Fielding

Necesas estonte mencii la fonton, el kie devenas la raporto.

## FRANCA-GERMANA REAMIKIĜO

Ni scias, ke politiko favoranta la konkursadon en armilprodukto kondukas al milito kaj baras ĉian socialan progreson. Sed, ĉu ĝi povas favorigi la franc-germanan reamikiĝon? Ne! Certa dozo da cinikeco necesas por tiel prezenti la aferojn al popolo, kiu ankoraŭ nun suferas en sia karno kaj koro pro la kruelaĵoj, kiujn al ĝi kaŭzis naziistoj.

La francan-germanan reamikiĝon ni deziras, ni arde volas, sed ĝi ne estos realigita per la konkordo de la francaj kaj germanaj trustoj, de Šneider kaj Krupp, ĝi ne estos real igita per la konkordo inter sinjoro Adenauer kaj liaj naziistaj generaloj kaj Mendes-France! Tiaj konkordoj cetere estas en plej alta grado kontraŭaj al la interesoj de Francio kaj Germanio. La francan-germanan reamikiĝon NI realigos per la ĉiam pli granda disvastigo de amikaj, frataj rilatoj inter la franca kaj germana popoloj. La pacamaj fortoj de Okcidenta Germanio, la germanaj komunistoj, socialdemokratoj kaj sindikatanoj, kiuj unuanime, escepte de 4 sindetenoj, deklaris sian opinion kontraŭ la resoldatemigo de sia lando dum sia lasta kongreso, la germanaj pacpartizanoj, devas scii, ke ili povas plene fidi la kompletan solidarecon de la franca popolo.

Alain LE LEAP
/membro de prezid. de la pacmovado/
Trad. W. Gilbert

## P R I   M I L I T R I F U Z O

/letero al la redakcio de PACO/

Kiam mi aliĝis al "MEM", mi faris tion, ĉar mi kredis, ke ĝi estas organizaĵo, kiu el objektívaj motivoj deziras pacon. Veran pacon povas akceli nur tia organizaĵo.

Sed kelkfoje mi konstatis, ke verdire "PACO" tute ne estas objektiva. De tempo al tempo ĝi enhavas artikolojn, kiuj laŭdas socialismon, kiel solan elirvojon, kaj -laste- en n-o. 14, estis artikoleto, (eĉ de la prerezidanto) kies tendenco estas ege forĵetinda, se la nomo de la gazeto ne estu nur sensencaĵo.

La artikoleto, "LETERO . . . AL K--DOJ SOLDATOJ" enhavas jenajn vortojn:

„Jes, kamaradoj, vi estas anoj de Popola armeo, kiu neniam atakos alian nacion, sed estas ĉiam preta defendi sian patrion kontraŭ eventuala atako fare malamikoj de la mondpaco."

Do...plena subteno al la soldatoj kiel tiaj!

Mi timas, ke "MEM" neniam atingos grandan membraron. Almenaŭ tio absolute ne okazos, se la rimedoj aplikataj ne grave aliiĝos.

Mi atentigas vin, ke kiu ajn lando forte substrekas, ke ĝuste ĝi deziras pacon. Aŭskultu la vortojn de Eisenhover aŭskultu tiujn de Malenkov - Sed malgraŭ tiu ŝajna deziro, la vortoj kontrastas kun la fakto, ke ĉiuj landoj lavas armeon kaj elspezas grandajn monsumojn por havigi al si kiel eble plej multajn kanonojn, flugmaŝinojn, bombojn .....

Kaj dume malsatas la plimulto de la homoj en la mondo!

Karaj amikoj, se oni volas estingi brulon, efikas nenion surverŝi benzinon.

Ĉiu soldato - li estu orientano aŭ okcidentano - donas sian kontribuon al milito per sia soldatiĝo, kaj paca movado DEVAS labori ne por kuraĝigi soldatojn de tiu

lando aŭ tiu ĉi, sed por nuligi ĉiujm armeojn, por instigi al junuloj de la mondo rifuzi militservon!

Multaj kapablas unuigi la pacvolajn fortojn de la okcidenta bloko, multaj kapablas unuigi tiujn de la orienta, sed la problemo estas: unuigi la okcidentajn KAJ la orientajn pacfortojn!

Vera pacmovado nuntempa devas klopodi solvi tiun problemon!

Pacmovado estas pont-iga.

Ole Noderland
La militrifuzantejo, OKSBØL,
Danlando.

LA REDAKCIO RESPONDAS:

"Objektiveco" estas respekto de la vero. Kaj Vero estas, ke Hitler kaŭzis la plej abomenajn krimojn en la homa historio, Vero estas, ke la usonaj aŭ la britaj koloniistoj subpremas milionojn da homoj en la tuta mondo, Vero estas, ke Usono havis nenion por fari en Koreio, sed tamen daŭrigas sian agreson kontraŭ Ĉinio, Vero estas, ke la usonaj militaviadiloj minacas la ĉinan teritorion, sed, ke neniu ĉina aviadilo atakis amerikan urbon, Vero estas, ke la organizo de Nordatlantika kontrakto decidis uzi evetuale atom-bombojn sen antaŭa averto, dum la Sovetunio senĉese proponas senarmigadon kaj malpermeson de amasdetruaj armiloj, Vero estas, ke kapitalismo ĉiam kortraŭbatalis per ĉiuj rimedoj la popolojn, kiuj elektis alian reĝimon, Vero estas ankaŭ, ke Malenkov neniam minacis agresi iun ajn landon, dum usonaj ŝtatistoj povas tute libere paroli pri PREVENTA MILITO ...

Ĉu tio ns sufiĉas por elmontri, ke la socialismaj kaj popoldem. landoj estas DEVIGATAJ proteki sin per forta armeo, ke militrifuzo en tiuj landoj estus sinonimo de memmortigo?

La pacmovado, kies fako estas nia "MEM", ne devigas siajn amikojn aprobi la reĝimojn de tiuj landoj, sed ili almenaŭ honeste rekonu ties paceman sintenon. Rifuzi la militservon, certe estas kuraĝa sinteno kontraŭ agresivaj preparoj, sed ne devigu paceman homon pasive akcepti batojn de fibatalemulo!

La pacmovacdo ne povas akcepti, ke oni fermu la okulojn antaŭ faktoj kaj ke oni ne serĉu, kie troviĝas la veraj militinstigantoj. Ĝi ankaŭ ne povas akcepti, entute la programojn kaj ideojn de ĈIUJ siaj membroj, ĉar ĝi volas unuigi ĈIUJN PACFORTOJN, komunistojn, socialdemokratojn aŭ militrifuzantojn, katolikojn aŭ liberpensulojn sur la bazo de simpla programo por ĉiuj akceptebla, ekz. la iom post ioma senarmigado kaj la malpermeso de amasdetruaj armiloj. Tion povas akcepti eĉ kapitalistoj, se ili konsideras, ke socialismo minacas ilin. Tion povas akcepti ĉiuj sinceraj kaj honestaj homoj, sendepende de siaj personaj opinioj. Tiamaniere ni atingos decidigan forton, por malhelpi novan militon: En unueco estas forto!

Por la red. W. GILBERT

Rim.: Ni petas nian korespondanton atente la artikolon "Iom pri nia gazeto" en la lasta n-ro de PACO (oktobro 1954)

Rilate la kritikan artikolon, kiun skribis nia prezidanto, ni tre ŝatus aŭdi ankaŭ opiniojn de ceteraj niaj legantoj.

# LA 360 MILIONA HINDA POPOLO ESTAS APUD TIUJ, KIUJ BATALAS POR LA PACO

(El parolado kun la hindia verkisto Pandit Sunderlal)

La ĵurnalistino de hungara gazeto SZABAT NÉP, Eva Szilágyi, havis intervjuon kun la gvidanto de la hindia pacdelegitaro, la verkisto Pandit Sunderlal. El tiu ĉi interparolado mi volas citi jenan interesan parton:

"Mi estas membro de registara partio, la Hindia Nacia Kongrespartio, jam de 50 jaroj. Mi batalis kontraŭ la britaj koloniistoj, en provinco de Hindio mi gvidis la kontraŭbritan movadon. Mi estas disĉiplo de Mahatma Gandi. (P. Suııderlal estas ankaŭ prezid. de la Hinda-Ĉina Amikec-Societo, vicprez. de la Tuthindia Packonsilantaro kaj sekretario de la Hindustana Kultursocieto).

"De 50 jaroj mi havas proksiman rilaton kun mia popolo. Ankaŭ en la pasintaj monatoj mi travojaĝis nian landon de nordo de la neĝkovritaj montoj de la Himalajo ĝis la sudaj provincoj de la oriente situanta ASAM ĝis la okcidenta BOMBAY. Ka ĉar mi iradas inter mia popolo, mi konas mian popoloan kaj povas deklari, plene konsciante pri mia respondeco, ke la 360-miliona hindia popolo staras apud tiuj, kiuj luktas por la paco.

Se iu demandus, kial? La respondo estus simpla: Ni scias kio estas imperialismo, ni konas la subpremon. (Poste li parolis pri la al ili proksima minaco de nova mondmilito kaj, ke la paco signifas por ili vivneceson. "Por la evoluo, feliĉiĝo da nia lando, por leviĝo de la vivnivelo de nia popolo necesas paco."

Li parolis ankaŭ pri tio, kion klopodas lia registaro kaj precipe la ministroprezidanto NEHRU en la nuna malfacila diplomata situacio por la defendo de la paco.

"Nia registaro opinias, ke la paca solvo de disputdemandoj inter la nacioj estas la ĝusta solvo." (Do, ĝi havas la saman opinion, kian deklaris jam plifrua la Monda Packonsilantaro).

Li parolis kontraŭ ĉia milita kontrakto, kontraŭ ĉia politika bloko kaj deklaris, ke Hindio ne permesos eĉ nur manplatan teritorion de sia lando uzi por celoj kontraŭ Ĉinio aŭ kontraŭ la Sovjetunio.

Li rimarkis, ke la ĉina-hinda amikec-kontrakto pruvas, ke oni povas amike aranĝi la disputdemandojn inter la nacioj kaj popoloj, samtempe reciproke estimante la interesojn de aliaj pro la 1.800 mejla limo inter Ĉinio kaj Hindio la kontrakto estas grandsignifa ne nur por ambaŭ popoloj, sed por la tuta Azio.

Parolante pri la rilatoj inter la du grandaj landoj – kiuj ja kune havas preskaŭ miliardan loĝantaron – li diris, ke ili rigardas la nunan registaron de Ĉinio, kiel sole pravan, sen kiu U.N.O. ne povas plenumi sian taskon. La Hinda-ĉina Amikec-societo laboras en 180 urboj de nia Lando. Oficialaj kaj neoficialaj delegitaroj reciproke vizitadas ambaŭ landojn. Antaŭ nelonge tri junaj hindaj profesoroj vojaĝis al Peking por instrui en tiea universitato la urdu- kaj hindu-stanan lingvojn. Oni ankaŭ multe diskonigas la ĉinan literaturon, revuojn, kiuj estas ĉie aĉeteblaj en hinda kaj angla lingvoj.

Oni eĉ postulas pli fortajn politikajn, ekonomiajn kaj kulturajn rilatojn inter la

du landoj.

Bedaŭrinde neniu povis ĝis nun efike klarigi al la organizantoj de la du landoj, precipe sur kulturtereno, kiom helpus la pli intiman kunligon kaj la reciprokan konatiĝon la uzado de Esperanto. Ili devas pene traduki en por ili malfacilan fremdan lingvon kaj ili eĉ devas uzi la por ili tute fremdan anglan lingvon, kiel helplingvon, kvankam Esperanto ankaŭ por Azianoj estus multe pli facila. Ili devus lerni de la Japanoj, inter kiuj verkistoj kaj scienculoj uzas la internacian lingvon por siaj celoj. Ankaŭ la pacmovado pli facile laborus per tiu lingvo disvastigante siajn alvokojn kaj sciigojn inter la popoloj.

Pál BALKANYI
BUDAPEST

## TIU MOVADO DEVAS PROGRESI

Multajn interesajn artikolojn mi tralagis en n-o. 8a de "PACO".

Mi rimarkas, ke iom post iom vastiĝas la esperantista movado en la rondoj de demokratiaj popoloj.

Grandan servon montras nia lingvo al la porpaca movado en multoblaj landoj. Tiu movado devas progresi plue, ja la bono de la homaro!

Simon MRKTIČJA
Armenia Sovjetrespubl.

## EL LA MONDPACKONSILANTARA KUNVENO EN VIENO

La Monda Packonsilantaro kunvenis la 18. de jan. en Vieno. La danĝero de minacanta uzo de da atom- kaj hidrogen-bomboj igis ĝin fari gravajn decidojn kontraŭ la alproksimiĝanta danĝero. La sekvintan tagon okaziĝis manifestkunveno, en kiu la membroj de la Mondpackonsilantaro estis de profesoro Brandweiner al la kunvenintoj prezentitaj kaj salutitaj.

Jen ege mallongigita ekstrakto el la paroloj de la konsilantar-membroj:

Isabella BLUME (Belgio) klarigis la signifon de la alvoko de la estrar-plenumkomitato, kiel malebligis la atom-militon pere de la okaziĝinta subskribkampanjo. Ŝi diris: "La horo de la decido venis, la homoj de la mondo devos elekti inter vivo kaj morto!" Instituto SUNDERLAL (Hindio) alportis salutojn de la hinda popolo, kiu decide kontraŭstaros la uzon de atomarmiloj.

KUO MO ĴO (Ĉinio), kiu sian paroladon dum granda aplaŭdo mem tradukis germanlingven, diris: Ni volas neniigi la atomarmilojn kaj ne volas pere de ili esti neniigitaj! La ĉina popolo unuigos ĉiujn klopodojn kun ĉiuj, por forigi la danĝeron de atommilito.

La angla advokato PRITT raportis ke la grandparto de „Labour-Party“ absolute kontraŭstaras la rearmigon de Germanio.

Aleksandro KORNEJČUK diris, ke sur la mondo nenia pli granda forto povas ekzisti, ol la forto de la popoloj, kiuj neniigos la aventurajn planojn de la organizantoj de atom-milito.

Profesoro Kaoru YASUI (Japanio) raportis pri Bikini kaj la terura sorto de fiŝistoj sur japana ŝipo "FUKUJU MARU" kaj la rezultoj de la subskribkampanjo kontraŭ la

atom-bombo en Japanio, ĉe kiu kolektiĝis 30 milionoj da subskriboj.
Deputito ECKERT (Okc. Germanio) raportis pri la defenda batalo de la germana popolo kontraŭ la militigo.
Profesoro Leopold INFELD (Polio) substrekis sian simpation al la urbo Vieno, kiun li ŝatas ek de sia junaĝo, kaj akcentis la volon de la pola popolo kaj ceteraj popoldem. landoj, uzi la atomenergion nepre nur per pacaj kaj progresemaj celoj.

La manifestkunveno unuanime salutis la mondkampanjon kontraŭ la danĝero de atom-milito.

Post la suferoj kaj mizero kaŭze de du mondmilitoj, nia popolo deziras nenion pli urĝe ol la konservon de la paco. Tial postulas la vivintereso de la aŭstria popolo, treege klopodi por konservi la pacon!" Tiel ni legas en la lastaj linioj de unuanime akceptita rezolucio de la manifestkunveno.

J. KRAL
Ĉeestinta del. de Aŭstria pacrondo Esperantista.

## EL LETERO DE JAPANA VERKISTO

. . . . ne per frazoj, sed per agoj la Mondpackonsilantaro devas pruvi, ke ĝi vere kaj sincere volas internacian kulturinterŝanĝon. Tiam ĝi ne povus eviti klaran respondon al demandoj de multaj esperantistoj en la mondo, kial ĝi ĝis nun ignoris, eĉ pli, malfavoris Esperanton, tiun ekstreme utilan ilon por vasta internacia kulturinterŝanĝo, kompreniĝo kaj amikiĝo. Ili devus utiligi Esperanton, se ili ne volus bankrotigi en la okuloj de la popoloj de la mondo. Kiel progresos tiu afero? Nu, mi streĉite observos. Mi mem estas skeptika, sed mi sincere esperas, ke Cotton, Nenni kaj aliaj eminentuloj de la Packonsilantaro agos konsekvence al siaj deklaroj, kaj ke la afero fine sukcesos.

## KION SKRIBAS SOVJETA LINGVOSCIENCULO

..... vi estas tute prava pri urĝa neceso de larĝa kaj diverseca kultura kontakto inter Sovjetio kaj respublikoj de popolaa demokratio. Speciale tian kontakton bezonas ni, scienculoj.

Problemo de internacia lingvo, pri kiu vi havas specialan intereson, ankaŭ min tre interesas. Artefaritaj lingvoj, inter ili Esperanto, ludos gravan rolon en procedo de finfina realigo de tuthomara lingvo estonta. Pro tio marksisma lingvoscienco havas inter siaj studobjektoj ankaŭ Esperanton. Sed la nuna internacia stato, kiam imperialismaj, reakciaj fortoj celas mondan regadon, dispremon de libervolaj popoloj kun iliaj kulturoj, kaj lingoj, malhelpas sukcesan disvastigon de Esperanto.

En Sovjetunio Esperanto nun ne estas populara, tre malmultaj interesiĝas pri ĝi kaj studas ĝin.

Mi persone havas intereson pri Esperanto, Esperanto-movado kaj ĝia praktika utiligado. Eble mi en sekvanta jaro (1955) povos renovigi mian antaŭ longa komencitan verkon pri internacia lingvo. Bedaŭrinde mi ne havis sufiĉe da tempo ĝis nun por observi la movadon kaj lastatempan Esperanto-literaturon, precipe periodaĵojn.

Rim. de la red.: La ekstraktojn el japana kaj sovjeta leteroj nia red. ricevis de k-do Pál Balkányi, kiu bedaŭrinde forgesis mencii la nomojn de la aŭtoroj.

## AL AMIKOJ DE PACO

La 22an de majo okaziĝos la Monda Packongreso en Helsinki. Ĝi daŭros 5 tagojn.

La OKCIDENT-FINNLANDA PACKONSILANTARO kun sidejo en la havenurbo TURKU aranĝos postkongresan pacmanifestacion kaj feston. Ĉar multaj kongresanoj hejmvojaĝos tra nia urbo per ŝipo "TURKU-STOCKHOLM" ni invitas ilin viziti nian feston.Specialajn invitojn ni sendas al Skandinavio kaj Leningrado.

Samtempe ni projektas aranĝi porpacan ekspozicion. Ni jam havas plakatojn, fosojn, gazetojn el multaj landoj, sed ni ŝatus ricevi ankoraŭ pluan materialon. Ju pli ampleksa nia ekspozicio estos, des pli ĝi imponos la vizitontojn.

Pro tio ni petas ĉiujn gek-dojn, helpu al ni! Sendu ĉiun taŭgan materialon kiel eble plej frue, tuj. Ni post la uzo ĝin resendos aŭ rekompencos per samvalora el nia lando.

Ni rememorigas al vi, ke kvankam oficiale ni ankoraŭ ne uzas la internacian lingvon, ni tamen volas konvinkiĝi, ĉu Esp. povas helpi al la pacmovado.

Kun kor pacsaluto
OKCIDENTA FINNLANDA PACKONSIL.
Sekr.: Leo VIRTANEN, Kaskengatu 9 as 3, TURKU, Finnlando.

## LETERO AL LA GEESPERANTISTOJ

Verdsteluloj karaj kaj senlacaj,
dissemitaj ĉie en la mond',
helpu al klopodoj niaj pacaj
kune kun por paca via rond'.

Nin timigas militinstisantoj
per teruro de l' atoma bomb',
sed iliaj revoj restos vantaj -
ili mem troviĝos en la tomb'.

Vokas nin saviĝo de MONDPACO
kaj vi venu urĝe, sen hezit',
por forigo nepra de l' minaco
timiganta nin per la vizit'.

Karaj samcelantoj en luktado
batalantoj de soci-justec',
por ke plu ne estu militado,
kontribuu vi per tutspertec'.

Por ke povu ŝtatoj kunloĝadi
sendepende de socia ord',
devas ni, tutforte kunigadi
al nulig' de l' ajna malkonkord'.

Verdsteluloj karaj kaj senlacaj,
dissemitaj ĉie sur la ter',
helpu al klopodoj niaj pacaj,

por finvenko de la pac-afer'!

Ĵ E T U  Ŝ T O N O N!

Sur dormantan lag-surfacon
ŝtonon sendu vi per ĵet',
rompos vi la akvo-pacon
kaj ekrulos rond-ondet'  .. .

Al la ŝtono ond-faranta
tre similas PAC-leter'
kaj la lago kvietanta, -
verda rondo sen esper'.

Kamarado ĵetu ŝtonon
al la trankvilanta lag',
faros vi sennombran bonon
por triumf' de verda flag'.

Vi ĵetadu ja sen ĉeso
ĝis fariĝos granda ond'
vi batalu por progreso
kaj por paco en la mond'.

Ke nuntempe ventoblovo
ekkaresu "La esper'",
partoprenu kun tutpovo
kavalir' de pac-afer'.

Sur dormantan lag-surfacon
ŝtonon sendu vi per ĵet',
rompos vi la akvo-pacon
tuj ekrulos rond-ondet' . . .

ESPERANTISTIĜO
Lernanto li estis malgranda
en iu provinca urbet',
kie trafis lin vok' propaganda:
„Verdiĝu, ho kara knabet'!"

Ĝis tiam li juna ne estis
pri tiu ĉi mond-lingvouz'
kaj tuj envici li konsciis -
Ĉu eblis senhonta rifuz'?

En tempo mallonga elstudis
li lingvon de „L'Internaci'"
kaj per la trumpeto ekludis
al homoj de ĉiu naci':

„Ke povu verdstelaj armeoj
la mondon konkeri sen bar',
batalu kontraŭ farizeoj,
Antaŭen Esperantistar'!

Antaŭen milmiloj verduloj
de landoj kaj rasoj sur ter',
antaŭen vi karaj bravuloj
por PACO volata, por VER'!"

Li tion adoris junante
kaj samon subtenis ĝis fin',
gejunaj, daŭrigu kunkante
ĉi vervan alvokon sen tim'!

Tiujn ĉi tri perlojn de pacpoemoj speciale verkis por nia organo k-do. Canko MURGIN, Kvartalo Malĉika 41, SOFIA-29, Bulgario.
Ni esperas, ke niaj gekamaradoj ilin multe utiligos por siaj kunvenoj, festoj kaj aliaj okazintaĵoj, por propagandi Esperanton kaj la ideon de mondpaco.
Dankon al k-do. C. Murgin!

<u>HIROŜIMA</u>
Speciala kontribuo de portugala k-do. Saldanha Carreira al nia frata japana pacbulteno „JUNAJ HERBOJ"

JUNAJ HERBOJ, naskiĝintaj
el plej dolĉa, pura amo,
via vivo iĝis dramo.

Oni tretis vin kruele,
vi fariĝis ja viktimoj,
sed ne estos pluaj krimoj.

Nova menso, nova vivo,
fine brilos kaj la cerboj
resaniĝos, JUNAJ HERBOJ.

Tiam, HERBOJ, vi fieros
antaŭ provo, kvankam kruda
tre utila, tre konkluda

por la paco, ĉar, fenikse,
el la cindroj venas ondo
da feliĉo por la mondo.

Aŭdu, aŭdu .....
Ĉiu krias
la usonan geston krima ...
RENASKIĜU, HIROŜIMA!

Usonanoj vin atakis
kiel lupaj fibarbaroj!
ĉar ne estis kontraŭstaroj.

Ili estris la atomon,
ili sciis vin sanŝirmaj
kaj sin sentis fortaj, firmaj.

Sed hodiaŭ ja al ĉiuj
apartenas la afero
kaj minacas la danĝero,

do trifoje la murdontoj
pensos, antaŭ ol decidi
sian vivon mem perfidi.

Kiam iu el la nacioj
uzi bombojn nun sin tentos,
la ceteraj ne konsentos.

Aŭdu, aŭdu .....
Ĉiu krias
la usonan geston krima ...
RENASKIĜU, HIROŜIMA!

## KANTOJ KONTRIBUAS AL LA PACO

Lastatempe en Japanio la movado de "Porpaca Kantado" viglas tre rimarkeble tra la tuta lando kaj dum tri tagoj de 27a novembro Tutjapana Kantist-kunveno havis lokon en Tokio, kiun partoprenis ĉirkaŭ 30.000 pac-amantoj (laboristoj, kamparanoj, studentoj kaj aliaj el ĉiuj partoj de nia lando, kaj ili ĉiuj plifirmigis sian decidon batali por paco, libereco, sendependeco kaj demokratio. Kio kaŭzis tiun ĉi brilan sukceson, tio estis la potenco de la landskala "Porpaca Kantado" de dekoj da milionoj de pacamantaj popolanoj.

Depost la "cindroj de Bikini" la malpermeso de la atom- kaj hidrogenbomboj fariĝis la komuna kaj ĝenerala deziro de la tuta nacio kaj la kanto "NI NE ALLASU

PLU LA ATOM-BOMBON" rapide disvastiĝis tra la tuta lando.

Okaze de vizito al Japanio (la unua oficiala vizito de Ĉinoj post la mondmilito) de s-ino. Li Te-ĉuang, la prezidantino de la Ĉina Ruĝa Kruco, la kanto "TOKIO-PEKINO" el nia ĝenerala amikeca sento al Ĉinio, la japana popolo, kiu fervore deziras la renovigon de amikaj rilatoj kun Ĉinio, varme kaj entuziasme bonvenigis ŝin.

La "PORPACA KANTADO" jam ne estas nur porpaca potenco, sed ĝi nun estas fariĝanta grandega forto por batalakiri nian pacon.

Hirokazu KAĴI, AITI-KEN

<u>URĜA ALVOKO</u> Ĉeĥoslovakaj gek-doj suferas mankon da Esperanto-literaturo. Ne eblas aĉeti en eksterlando. Por almenaŭ parte likvidi ĝin, ni estas pretaj doni senpagan jarabonon de nia bulteno "LA PACDEFENDANTO" al ĉiu k-do-ino, kiu sendos al ili la libron de K. H. Borovský: BAPTO DE CARO VLADIMIRO. Ĉiujn sendaĵojn adresu al: K-do Rudolf BURDA, Palackého nám. č. 6, PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio.

## LA VERA LIBERECO

Ekzistas ankoraŭ tiaj specoj da gentoj, klanoj, en teritorioj izolitaj de la homoj, kies vivo estas preskaŭ la sama, kiel antaŭ dek aŭ dudek mil jaroj. Kiam la klano interrilatas kun blankaj homoj, iom post iom formortas la klano, aŭ rifuĝas en la ĝangalon, aŭ en tundron de la glaci-kampoj. La blanka homo alportas siajn terurajn malsanojn: la brandon kaj la ekspluatadon. Kontraŭ tiuj nur la profundeco de la praarbaro aŭ 1a glaci-kampoj helpas.

Douglas, ĉefjuĝisto (el Usono) vizitis en la jaro 1952 Malaja-duoninsulon kaj studadis la vivon de la "Sakai"-praindiĝena klano. Tiu klano ankoraŭ havas 16.000 membrojn. Ili loĝas en la rondo de praarbaro aŭ interne de ĝi. Ilia ĉefa nutraĵo estas viando de simioj, aproj kaj fiŝoj.

Ili havas ankaŭ primitivan agronomion en la densejo, kiun ili akiras de la praarbaro per malfacilega laboro. Tie ili produktas rizon, dolĉan terpomon, bananon kaj tapiokon. Sed dum kelkaj jaroj ili forĉerpas la prahumon kaj migradas pluen. Dum 100 jaroj ili ne scipovas skribi kaj legi kaj nun sub la angla registaro same ne lernis tion. Ili havas sian propran lingvon, sed laŭdire ili povas kalkuli nur ĝis tri.

Laŭ la ĉefjuĝisto Douglas, la Angloj asertas tion, ke la "Sakai"-anoj nur en la tiel nom. Partizanoj (komunistoj) vidas siajn solajn amikojn. Kiam la angla registaro konstruigis novajn, higienajn vilaĝojn por ili, en mirakla maniero ili forkuris de la civilizacio. Nature tion ankaŭ la partizanoj kaŭzis.

Samtempe aperis verko pri "Ĉukĉa"eskima gento de Juri Ritkeu, kiu naskiĝis en jarango de siberiaj glaci-kampoj kaj nun studadas en la universitato de Leningrado. La Ĉukĉa gento vivas tiom malproksime norde - ili rifuĝis antaŭ la rusa caro - ke la ĉukĉa popolo absolute ne konas la sunon. La sledo estis ilia sola trafika rimedo. Iliaj kabanoj estas el bestaj feloj. La rangiferan bredadon ili faras komune en kolektiva mastrumado. Agronomio nature estas neebla. Ili hvas ankaŭ balenajn ŝipojn en la Ĉukĉua maro, kiujn motoro pelas. La membroj de la Ĉukĉa kolektivo ne nur scias legi kaj skribi, sed ili scias ankaŭ kalkuli, kiom da petrolo bezonas la motoro.

La klano posedas lernejon, en kiu la junularo lernas ankaŭ la rusan lingvon kaj talentitajn studentojn oni sendas por studadi al Habarovsk (apud la Amur-rivero) aŭ al al Leningrado. Antaŭ nelonge la kolektiva mastrumejo pro sia bona laboro ricevis de la registaro 5 lignajn domojn kun fenestroj kaj litoj. Tutcerte neniu forkuris, eĉ en kunveno la plej laboremaj membroj ricevis donacojn por siaj meritoj.

Inter ili vivas eŭropa instruisto, kiu gvidas la lernejon kaj pioniran grupon kaj civilizas, informas ilin pri la origino de la mondo kaj multaj aliaj aferoj, ekzemple pri la suno, kiun la ĉukĉaj infanoj kaj plenkreskuloj neniam vidis kaj pri kiu ili neniam ion aŭdis. Inter ili vivas mekanikisto, kiu metis fenestron sur la supra parto de la jarango. La ĉukĉa lingvo ne konas la vorton "Fenestro" kaj anstataŭ ĝi ili uzas la vorton "Lumo".

La ĉukĉa klano jam havas ankaŭ urbon, kiun ili nomas Anadir. Tie ankaŭ troviĝas ilia ĉefa lernejo. En la regiono de la klano estas 7klasa elementa lernejo.

Kia granda diferenco estas inter la du praindiĝenaj popoloj?

La unaa forkuras de la brita kolonia armita forto, eĉ se oni konstruas por ili senpagajn domojn, kaj donas al ili manĝaĵojn, ĉar ili ne povas elteni la ekspluatadon. Por libereco pli volonte ili preferas preni malsaton, malsanojn kaj minacon de sovaĝaj bestoj en la praarbaro.

Supre en la nordo la Ĉukĉoj vizitas normalajn lernejojn, kolektiva mastrumado defendas ilin antaŭ la malsato kaj per motorŝipoj ili iras ĉasi balenojn.

Post ĉio ĉi homoj ankoraŭ ne scias, kie estas la libera mondo - „La vera libereco“

Georgo GABOR – Usono

## <u>A L V O K O</u>

pri aranĝota mondmitingo de reprezentantoj de ĉiuj porpacaj fortoj.

En la mondo kun gravaj ebloj konservi la pacon montriĝas novaj danĝeroj, kiuj povas nenniigi ĉiujn tiajn eblecojn.

Nur potenca movado, kreiĝanta el la popoloj mem, povas malhelpi la dispartigon de la mondo je sin konstruantaj formaĵoj, malebligi la restarigon de armeoj, kiuj sekvigis tiom da larmoj kaj malĝojo, kaj la homaron liberigi de la premantaj ŝarĝoj de armebudĝetoj. Ĉi tiu potenca movado sola povas garantii la kunlaboradon de la nacioj por la konservado de ilia bonstato, ilia sendependeco kaj ilia komuna sekureco.

La Monda Packonsilantaro solene alvokas ĉiujn fortojn de la paco, ĉiujn virojn, ĉiujn virinojn, kiuj deziras vivi liberaj de angoro, liberaj de malfido kaj liberaj de la malamo kontraŭ aliaj popoloj. Ĝi vokas ilin kunigi siajn klopodojn, antaŭ ol estos tro malfrue.

Tial ĝi decidis kunvoki grandan mondmitingon de reprezentantoj de ĉiaj fortoj de la paco por la dua duono de la monato majo 1955.

Stockholm la 23. de nov.1954

Tiu ĉi mondmitingo de pacaj fortoj okaziĝos en Helsinki (Finnlando) kaj niaj tieaj gek-doj jam nun garantias al ĉiuj alvenontaj esperantistoj senpagan loĝadon k. manĝadon. Dependas nun de ĉiuj Esperanto-organizoj, ke ili klopodu ĉe siaj 1andaj

kaj lokaj naciaj packomitatoj pere de aktiva kunlaboro akiri la eblecon elsendi esperantistan delegiton al tiu ĉi mondmitingo.

La rezultoj de tiu agado estu sciigotaj al la koncerna landa "MEM"-peranto, kiuj ilin resume komuniku por centra organizado al nia gen. sekretario, k-do. Anton BALAGUE, Kirchenweg N-o 12, Sankt pölte. Aŭstrio,

D-ro Ad. HALBEDL, R. BURDA

## RASISMA BATALO EN USONO

Oni certe scias, ke la lastaj decidoj de la usona registaro metis la finpunkton al la malkaŝita batalo kontraŭ Nigruloj, la civitanoj de tiu granda lando.

Ĉiuj demokratoj, liberecanoj kaj ĝenerale maldekstruloj en la mondo tre ĝoji pro la bona novaĵo, en la espero, ke fine ĉesos la malciviliza batalo kontraŭ la Nigruloj kaj konsekvence de tiu ĝojo, oni diris kontentigite: „Pli bone malfrue ol neniam!“

Sed kio okazis post la menciitaj registaraj decidoj? Simple, tre simple jeno: En multaj landoj de la Usona Federacio, civitanoj ... malcivilizitaj, ribelis kontraŭ la nova leĝo pri rasisma malstreĉo kaj ne nur geknaboj el nigrakolora raso estis forpelitaj el la lernejoj, sed ankaŭ studentoj ne estis akceptitaj, ekz. en la universitato de la urbo Memphis. Sed estas pli, ĉi lastaj estis forpelitaj mem de la universitata rektoro.

Estas dekoj kaj dekoj da fiagoj, kiuj komprenigas, ke bedaŭrinde, la ĝojo, kiun oni havis dum la unuaj momentoj, estis erare bazita. Pri la menciitaj fiagoj kontraŭ la nigraj gelernantoj eblas paroli aliafoje, sed nun oni povas demandi la rasismajn Usonanojn, ĉu ili kapablas rimarki (kompreni): unue la grandan kontraŭdiron inter la ĝusta, ĝustega batalo, kiun Usono dum la lasta mondmilito faris kune kun siaj aliancanoj kontraŭ la rasismo de Hitler, kaj due, la malcivilizecon aktualan, kiun ili estas praktikantaj nun kontraŭ la nigraj studentoj?

Por nun ankoraŭ oni povus esperi, sekve de la ĵusa venko de la Usona Demokrata Partio en la baloto por elekto de deputitaro, ke la nova plimulto de ĉi lasta igu respekti la decidojn de la registaro pri la fino de la rasisme hontiga sintenado rilate al nigraj studentoj.

Nur kiam la novaj deputitoj agos tiamaniere, ke la usonaj rasismaj rondoj devu ĉesi sian malcivilizan batalon kontraŭ la Negroj, oni povos diri, ke la nova demokrata plimulto en la usona parlamento estas vere demokrata!

Erduardo ZUMBO

## NIA MOVADO EN DANLANDO

La laboro por nia movado ĉi tie fakte estas tre malfacila, ĉar multaj Danoj konsideras ĉian pacmovadon komunistan, kaj speciale la nian, ĉar ĝi venas el Ĉeĥoslovakio. Grandajn sukcesojn mi tial ne povas montri. Ankaŭ mi ne kolektis multajn abonantojr por nia "PACO", sed la afero tamen kreskas kaj supozeble iom post iom ni venkos ankaŭ ĉi tie.

Mi kontaktas kun la landa asocio "WAR RESISTERS INTERNATIONAL" (Internaciaj militrifuzantoj) kaj ĝia organo "PACIFISTEN" publikis jam artikolon pri nia movado en sia februara eldono.

Krom tio mi kontaktas kun alia movado, laborante por la paco. Temas pri la vojaĝ-movado "SERVAS". Ĝia celo estas ebligi interŝanĝon de gejunuloj kun diversaj landoj. Tiu movado naskiĝis en Japanio kaj disvastiĝas nun ankaŭ al Germanio, Anglio, Usono, Norvegio, Nederlando, Israelo kaj Hindio. La movado konsistas el du specoj da membroj: gastigantoj kaj gastoj. Al ĝi aliĝas homoj, kiuj pretas senpage gastigi dum 1-3 tagoj junan amikon el alia lando. La gejunuloj, kiuj deziras vojaĝi, nur pagas al landa filio malaltan kotizon kaj ricevas liston de gastigantoj el aliaj landoj. La prospektoj de tiu movado estis ĝis nun eldonitaj nur en angla lingvo, sed oni promesis eldoni ilin ankaŭ en Esperanto. Laŭ mia opinio temas pri bona ideo, sed ĝi havas unu gravan mankon: nome mankas al ĝi kontakto kun orienteŭropaj landoj. Sed pere de Esperanto, tiu manko verŝajne facile malaperos.

Willy NIELSEN

Kirkegaardsvej 54, HJØRRING, Dan.

.

PRI LA SITUACIO EN DDR

La 23. de jan. kunvenis en urbo DRESDEN la aktivaj gek-doj el diversaj lokoj de Gernana Demokrata Restubliko por diskuti la problemon kiamaniere akiri laborpermeson al la germ. "MEM"-sekcio kaj kiamaniere laŭ niaj statutoj labori.

K-do H. Löffler raportis, ke pli ol 30 gek-doj en DDR jam aliĝis al "MEM" kaj en ties senco laboras por la pacmovado. Pri bonaj sukcesoj en la pac-movado raportis ankaŭ k-doj. Hirsch, Bonnewitz kaj Ranft kaj per letero informis nin k-do. Schödl pri siaj sukcesoj en lernejoj kaj la pacmovado.

Ni kredas, ke en la nuna situacio la batalo por la paco bezonas ĉiujn fortojn kaj pro tio ni volas ripeti nian peton ĉe la instancoj de nia registaro por ricevi permeson starigi MEM-sekcion en DDR. Por apogi niajn klopodojn ni urĝe bezonas la helpon de ĉiuj MEM-sekcianoj.

1. /Skribu al la DDR-Parlamento en Berlino pri la valoro de Esperanto por la pacdefendo, donu ekzemplojn el viaj spertoj kaj postuli fondigon de MEM-sekcio en DDR.
2. /Ĉiuj legantoj skribu al siaj germ. korespondamikoj, ke tiuj aliĝu ĉe nia peranto de MEM kaj partoprenu petskribon por akiri permeson fondi MEM-sekcion.
3. /instigu viajn. germ. korespondantojn aliĝi al MEM kiel abonanto de "PACO", ĉe nia peranto.
4. /Ligu kontakton kun germanaj packomitatoj pere de MEM-anoj aŭ nia peranto.

Ni kredas, ke laŭ § 12 ni akiros eblecon povi publike labori per Esp-o por la mondpaco.

H. Löffler, Teaterstr. l, MITTWEIDA

DE MALSUPRE ONI NE KONTRAŬAS

Niaj klopodoj ĉe registaraj k. partiaj instancoj vere similas al luktado de Don Quichote kontraŭ ventmueliloj.

Pli bonajn fruktojn liveras la klopodoj en lernejoj kaj inter junaj pioniroj. La ĉi tiean lernejon mi kontaktis sukcese kun Sovjetio, ČSR, Italio, Svedio kaj Francio.

Ankaŭ la pioniroj en PIRNA interesiĝis post ricevo de letero el Ĉinio. Ilia estro mem demandis, ĉu mi povus aranĝi por ili kurson. Ĉiumonate ni havas kunvenon de la regiono PIRNA-DRESDEN. Mi nun klopodas aranĝi tiajn ankaŭ en KARL-MARX - STADT kaj alie.

Paul GLOCKNER, PIRNA, DDR.

## PRI BULGARA MEM

La 22an de februaro en nia regula semajna kunveno en SOFIA ni pritraktis la ĉefartikolon de "LA PACDEFENDAKTO" n-o. 38 pri la Esp-pacmovado en popoldemokr. landoj. Ni intencas fari la Bulgaran Esperanto Kooperativon, peranto de MEM por Bulgario.

Post longa atendado ni ricevis respondon, ke por eldono de Esp-bulteno tute ne estas necesa speciala permeso. Tio multege ĝojigis nin. Sed estas alia malhelpo. - Ne estas laŭplane antaŭvidita papero, sed la Bulg. Esp. Kooperativo (BEK) havas sufiĉan kvanton da papero en sia deponejo, kiu kontentigos nian bezonon dum la kuranta jaro kaj ekde la venonta jaro ni povos deziri, ke oni antaŭvidu paperon ankaŭ por nia gazeto.

Nian Tutbulgaran kunvenon partoprenis ĉ. 40 k-doj el Sofia, Pazarĝik, Plovdiv, Dimitrovo k. a. lokoj. Ok k-doj. devis antaŭ la fino forlasi la kunvenon aŭ pro malsano, aŭ pro troa okupiteco. Por aktivigi la Bulg. Esp. Asocion estis elektita tripersona komisiono, por helpi al la Centra komitato. Estas Prof. Stojan Ĝuĝev, Ivan Kovaĉev kaj Minko Conkovski.

Por restarigi la agadon de la Esp-societo ("Maxim Gorki") en Sofia estis elektita ankaŭ tripersona komisiono, k-do. Canko Murgin, Nikola Ivanov kaj Petát Popníkov. Post kontakto kun ĉiuj estraranoj de la sofia Esp-societo, ĉiuj konsentis kunvoki por la 20a de marto jarkunvenon por renovigi la estraron k. decidi aranĝojn por nia estonta partopreno en la Mondpaca Esperantista Movado.

Laŭ la sama maniero agos ankaŭ niaj societoj en aliaj lokoj.

La jarkunveno de la "BEK" decidis, ke ĝia pura gajno estu uzota por la esp-ista pacmovado.

Ni decidis, dum la kuranta jaro eldoni esp-tradukon de la libro "GEORGI DIMITROV" -konciza biografio, artikolaron "DEK JAROJ POPOLDEMOKRATA REĜIMO EN BULGARIO" kaj propran bultenon.

Canko MURGIN-Sofia

## NE PROKRASTU VIAN RAPORTON!

Certe vin interesos, ke la Aŭstria Packonsilantaro per sia letero el februaro tre petas, ke ni donu al ĝi konkretajn informojn pri la apartaj manieroj, laŭ kiuj en la diversaj landoj oni kolektis subskribojn sur la deklaroj de la popoloj kontraŭ la uzo de atomarmiloj.

Tial ni urĝe atentigas ĉiujn esperantistojn pri tiu gravega deziro kaj insiste petas ilin, raporti la koncernajn detalojn plej frue kaj rekte al:
Oesterreichischer Friedensrat, Brahmplatz 8/II, WIEN IV, Aŭstr.

Jen eble tento de dubenuloj pri la uzebleco kaj disvastigiteco de Esperanto ĝenerale k. por tuthomaraj celoj aparte! Ni faru tiun ĉi tenton pruvo de nia ĉiam

redirata aserto, ke per Esperanto oni jam ampleksas la mondon kaj ke la tutmonda pacmovado ne povas malhavi la servojn de Esperanto, se ĝi deziras resti serioza kaj nepre fidinda.

La Monda Packonsilantaro certe observadas nian agadon kaj jam nun faras ĉi tiun, kondiĉo de sia praktika rekono.

Jen ebleco, por montri nin publike utilaj! Ni eluzu la okazon! Post la rezulte, se ĝi sukcesos, certe ankoraŭ aliaj gravaj organizoj petos nian kunlaboron.

D-ro. Adolf HALBEDL
Knittelfeld, Aŭstr.

## AL LA ESP-PROBLEMO EN SOVJETIO

La manko de ebleco amase rilati per Esp-o ankaŭ. kun Sovjetanoj, devas ja ĉagreni ĉiun, kiu sincere intencas veran porpacan kunlaboron kun ĉiuj popoloj. Estas konate, ke V. I. Lenin, M. Gorki kaj versimile ankoraŭ aliaj eminentuloj de Sovjetio favore opiniis pri Esperanto kiel taŭga internacia lingvo. Ankaŭ J.V. Stalin parolis pri ebleco de unusola universala mondlingvo, supozante ĝin kvankam por la venontaj centjaroj, sed ne eksigante la eblecon uzi tian helplingvon en nuntempo sama kiel aliajn nacilingvojn.

Fatala miskompreno, laŭ kiu Esperanto estus esprimo de kosmopolitismo ekestis verŝajne el la opinio, ke ĝi celas forigi la naciajn lingvojn.

Mi atentigas al parto el teatraĵo de sovjeta aŭtoro S. Miĥalkov "ILJA GOLOVIN". Temas pri komponisto, kun kiu liaj amikoj Roslyj kaj Fedor disputas pri malsukceso de lia muzika verko; Roslyj: "Ilja Petroviĉ, vi ne komponis rusan muzikon, vi ne komponis muzikon sovjetan!"

Fedor: "Muziko povas esti tuthomara, por ĉiuj homoj. . . "

Roslyj: "Ankaŭ mi dezirus, ke ĝi estu tuthonara. Sed plejunue ĝi devas esti profunde nacia – kaj tiam, mi certigas vin -- tiam ludos kaj aŭskultos ĝin la tuta homaro.

/Al Golovin/: Tion, kion vi komponis, tio estas - ne ĉagrenu - tio estas ia muzika Esperanto! Sed mi ne parolas, nek kantas per Esperanto. Mi ne faros tion. Mi ne komprenas tiun lingvon, Ilja Petroviĉ!

Golovin: "Esperanton oni ja povas ellerni. . . . "

Roslyj (ĉagrenigite): Kial oni lernus ĝin? Ekzistas ja nenia esperantista popolo, nenia esperantista homo. Tion elkonstruis nur tiuj - tiuj - nu, tiuj - kiel oni nomas ilin? - tiuj kosmopolitoj!"

S. Miĥalkov videble kredas, ke Esperanto celas nuligi la naciajn lingvojn, kiuj estas ja la unua karakterizaĵo de nacia ekzisto. Li ne komprenas, ke Esperanto celas forigi la altrudadon de nacia lingvo de unu popolo al ceteraj nacioj, kio ja estas karakteriza por imperialismo! Li ne komprenas, ke Esperanto estas bonega ilo (Stalin ja parolis pri lingvo kiel ilo) eĉ por proleta internaciismo. Li ne komprenas, ke Esperanto ne celas detrui iun ajn reĝimon, sed, ke ĝi estas elpruvita, taŭga ilo por plifaciligi pacan konkuradon, kion ja Sovjetio ripete proklamas! Forĵeti tiun ilon, nur pro tio, ke eble iu povus ĝin misuzi por kontraŭŝtataj agoj, estus simila stultaĵo, kiel rifuzi uzadon de martelo por krea laboro nur pro tio, ĉar krimulo misuzis ĝin por murdo. Murdoj ja ne ĉesos, se oni pereigus martelojn, sed ili ĉesos, se oni per marteloj preparos vivkondiĉojn al plibona edukado de la homaro! Al tio celas ankaŭ

Esperanto.

Mi opinias, ke urĝe necesas, batali kontraŭ la malbrava opinio de Roslyj kaj simile opiniantaj. Necesas likvidi la miskomprenon, kaŭzitan per tiu ĉi opinio en Sovjetio. Konvinkado povus okazi ekz., per multnombraj leteroj de esp-istoj kaj Esp-organizoj al la sovjeta registaro, sovjetaj eminentuloj, verkistoj kaj radiostacioj. Eble ankoraŭ aliaj vojoj estas eblaj por starigi Esper. pacmovadon en Sovjetio. Ĉiuokaze oni devas agi persiste kaj pacience.

Certe ne estas dubinda, ke pli ĝusta sinteno de Sovjetio al E. signifus gravan kontribuon al porpaca j klopodoj. Mi petas vian opinion.

J. E. AMBROŽ, Špačkova 3, BRNO-Židenice, Ĉeĥoslovakio.

## <u>ĈU LA ELEKTRONCERBO ESTAS PLI SAĜA OL LA HOMA CERBO?</u>

En Usono oni, kiel mi scias, konstruis grandajn artefaritajn cerbojn, kiuj povas tre rapide solvi la plejmalfacilajn kalkulproblemojn.

En la libro "LA ESTONTO JAM KOMENCIĜIS" Robert Jung rakontas, ke en Waŝingtono estas "publika sekreto", ke estis tia elektroncerbo, kiu hejmenvokis generalon Mac-Arthur el Koreio dum la tiea milito. Tia tezo kompreneble bezonas klarigon kaj ĝi sekvas ĉi tie:

Mac-Arthur ja apartenas al tre agresiva parto de la usonaj arme-gvidantoj kaj la politiko, kiun li porbatalis en Oriento estis tiel danĝera, ke ĝi povus finiĝi per nova mondmilito ĉiam ajn. Nur tio ja devus esti kaŭzo por haltigi tiun ĉi fortan soldaton. Sed antaŭ ol fari tion, oni donis al du grandaj elektroncerboj en Vaŝingtono la jenan kalkulon:

Kiel fartos la ekonomio de Usono se tia milito okaziĝos? La maŝino ricevis ĉiujn sciigojn, kiujn oni havis pri nombro de loĝantaro en produktiva aĝo, pri ekonomiaj originoj, pri armiloj ktp. . . . . . .

Multaj nombroj estis prilaborataj de la maŝino kaj fine ĝi venis al jena rezulto:

U s o n o   p e r e o s !

Tiam la prezidanto decidis, ke la politiko de Mac-Arthur estas tro danĝera, kaj vokis lin hejmen.

Kiel vi vidas, niaj vivoj kaj la sorto de la mondo dependis nur de tia maŝino. Sed feliĉe por ni, ĉiuj tiu maŝino estis pli saĝa ol la homoj, kaj ni esperu, ke iuj homoj lernos ion de ĝi.

Willy NIELSEN
Danlando.

Al niaj amikoj Mogens Groth kaj Betty Larsen, Danlando:

Ni petas pardonon, ĉar ni nepublikis viajn gravajn raportojn pri la batalo de la dana popolo kontraŭ la rearmado de Germanio. Ili alvenis tro malfrue kaj ni jam posedis artikolon de W. Nielsen pri la sama temo, kiu estis sendita al la eldoninto de la febr. n-o. Ni esperas ricevi de vi estonte pluajn artikolojn. Estas dezirinde, ke ni hasu ilin plej malfrue la 10an de ĉiu monato por la sekvanta monato.

La redakcio.

## SUKCESOJ DE LA HUNGARA "MEM" -SEKCIO

Nia k-do L. Tóth, instruisto en GOMBA estis invitita fari paroladon dum granda loka pac-kunveno. Li laŭtlegis sciigojn pri atombombo el Japanio kaj la laboro de "MEM".

K-dino Magda Chirer en distrikta kunveno de partisekretarioj en Budapest konigis diversajn eksterlandajn pac-raportojn ricevitajn de mi kaj el nia organo "PACO", menciinte la laboron de "MEM". Poste noni vokis ŝin, fari pac-murgazetojn en la distrikta Partia Domo. Tiu ĉi bone sukcesis kaj ŝi denove simile prelegis en alia packunveno. Alia ĉeestinta pacsekretariino poste vizitis ŝin kaj petis la eksterl. pacraportojn, kiujn ŝi laŭtlegis en loĝej-kvartala partia kunveno aldonante, ke oni devas uzi ĉiun eblecon por plifaciligi pac-laboron kaj tiel estas gravaj la rektaj informoj el la okcidentaj landoj, kio estas malofte ebla. Tial estas utila la Esperanto-paclaboro k. ĝi devus aktivi en ĉiu organizo, movado kaj kunveno, kie oni parolas pri paco. Tiu ĉi k-dino: V. Zátony ricevis por bona paclaboro diplomon de la Hungara Landa Packonsilantaro. Oni elektis ŝin ankaŭ delegitinon por la landa pac-kongreso, al kiu oni ankaŭ invitis kiel gastojn, k-dinojn Chirer kaj Kenessei.

K-dino Chirer estis delegita en grandan distriktan packunvenon, kie ŝi antaŭ preskaŭ mil personoj prezentis raportojn kaj salutojn, ricevitajn pere de Esperanto, kaj transdonis ankaŭ saluton de "MEM". Tie ŝi prezentis ankaŭ la pacalvokon de la lab. esperantistoj el ĉehoslovaka uzino "TATRA" Kopřivnice, kies hung. tradukon mi publikis en du murgazetoj. Simile estis elmetita saluto de Stokholma Esp-packomitato kun bela bildo kaj pri nia nederlanda pacbatalanto Piet v. STAVEREN gazetbildoj ricevitajn de nederlanda pacamiko Ru Busong.

Ankaŭ k-dino. Konessei ricevis por bona porpaca laboro diplomon de la hung. packonsilantaro. Ŝi ankaŭ aktivas en societo de Ruĝa Kruco kaj ofte parolas en laborejaj partikunvenoj.

Al la IVa landa packongreso estis sendita ankaŭ, kiel oficiala delegito, nova MEM-ano d-ro Györy-Nagy, kiu estas prezidanto de distrikta packomitato en sia urbo kie li promesis aktivigi la esp-pacmovadon.

Pro la mallonga kaj jam antaŭe preparita programo de la la landa packongreso ne eblas tie paroli pri Esperanto. Saluton al ĝi sendis, k-do. R. Burda kiel prezidanto de MEM en ties nomo.

Pál BALKÁNYI, Budapest

## GRANDA INTERESO PRI LA SPARTAKIADO EN EKSTERLANDO

(Oficiala rap. el "SVOBODNÉ SLOVO" de 5a. marto 1955)

La nnuna jaro estos en nia respubliko signo de plialtigita aktiva kaj pasiva vojaĝfrekvento. Post mallonga paŭzo denove malfermiĝos la vojaĝfrekvento al niaj banlokoj en Karlovy Vary (Karlsbad), kie estos rezervita la sanatorio "Belevue" por okcidentlandaj gastoj. Plue al ni venos plinombraj grupoj da eksterlandanoj por viziti diversspecajn sportentreprenojn, kaj kun la popoldem. landoj ripetiĝos reciprokaj vizitoj, sed multe pli grandskale ol en la pasinta jaro.

La plejgranda intereso de la eksterlando kompreneble koncentriĝas je nia I. Tutŝtata Spartakiado, kiun vizitos fremdaj gastoj kaj speciale niaj samnacianoj el la tuta mondo. Tuj post la unuaj publikaĵoj de nia vojaĝoficejo "ČEDOK" kiu estas

komisiita por propagandi kaj organizi eksterlandajn vizitojn, montris intereson viziti malnovan patrion, samnacianoj el Kanada, Okc. Germanio, Francio, Svisio kaj el multaj aliaj eŭropaj landoj kaj ceteraj mondpartoj.

Por ili ĉiuj preparis "ČEDOK" kvintagajn programojn, en kiuj estas krom loĝado kaj manĝado enkalkulita ankaŭ la kotizo por viziti la festojn de la Spartakiado: rondveturo tra urbo Praha, ekskurso al Lidice, granda "Slap-digo" kaj laŭ deziro ankaŭ alien, teatrovizito kaj aliaj kulturaranĝoj. Okaze de la Spartakiado oni kalkulas en Praha (Praga) kun 50.000 vizitantoj el eksterlando, kiuj estos loĝigitaj laŭ la I. prezgrupo en la plejbonaj hoteloj de Praha, event. en proksima ĉirkaŭaĵo, laŭ la II. prez-grupo ili loĝos en modele ekipitaj 2-3litaj ĉambroj de plejbelaj studentaj kolegioj en Praha. Post fino de la Spartakiado, kompreneble neniu estos devigata veturi tuj al sia hejmo, ĉar male oni kalkulas, ke niaj samnacianoj laŭvole forlasos Praha-n por viziti siajn parencojn, siajn nasklokajn kaj aliajn vidindaĵojn de nia lando. Tiuj, kiuj havas parencojn en Praha, povos loĝi ĉe ili kaj la publikaj loĝeblecoj konserviĝas por tiuj, kiuj bezonos ilin.

Tradukis R. Burda

## TUTŜTATA KONFERENCO DE ĈEĤOSL. ESP. PACDEFENDANTOJ

Laŭ la antaŭiranta oficiala raporto montriĝas vastaj eblecoj post longa intervalo, ke eksterlandanoj okaze de la tutŝtata gimnastika festo, la SPARTAKIADO denove povos viziti Ĉeĥoslovakion. Ja, la oficialaj instancoj eĉ montras grandan intereson, allogi kiel eble plej multnombran gastaron por viziti la Spartakiadon en Praha, kiu okaziĝos de 23/6-6/7.1955. Ĉar al ni ankoraŭ ne ŝajnas esti donataj favoraj ŝancoj por inviti la MEM-kongreson al nia lando, ni almenaŭ decidis aranĝi dense kun la Spartakiado nian TUTŜTATAN KONFERENCON de 7a ĝis 10a de julio en la urbo OTROKOVICE por eluzi la eblecon, kiun donas la spartakiado al niaj eksterlandaj gekamaradoj, ke ili samtempe povu viziti nian Tutŝtatan konferencon. Ni forte kredas, ke senescepte ĉiuj interesuloj ricevos enirpermeson por viziti la Spartakiadon aŭ ĉe la ĉeĥosl. ambasadorejoj en siaj landoj, aŭ pere de la ĉsl. vojaĝagentejo "ČEDOK", Václavské nám. , PRAHA I., kiu korespondas en ĉiuj lingvoj.

Ne gravas, ĉu vi povas partopreni la tutan Spartakiadon. Vi ankaŭ povas viziti nur la ĉefajn aranĝojn, kiujn okaziĝos de 3-6a julio kaj laŭ la oficiala certigo de "ČEDOK", neniu estos devigata veturi tuj hejmen. Sekvi vi povas viziti viajn korespondantojn kaj ankaŭ nian TUTŜTATAN en Otrokovice, kiu komenciĝos la 7.de julio (kelkaj horoj per vagonaro). Rilatu jam nun kun viaj korespondantoj en ĈSR, ke ili estu al vi helpemaj konsilantoj kaj gastigantoj. Rilate via restado en Praha jam antaŭklopodas k-do Jaroslav ŠUSTR, Dlouhá č. 10, PRAHA I., kun kiu ni rekomendas kontakti, kaj k-do A. Zmeškal, Celetná č. 2, PRAHA I. ankaŭ pretas vin helpi.

En OTROKOVICE estas donataj konvenaj loĝlokoj kaj kunvenejoj. Ni jam kalkulas kun partopreno de pli ol 500 gek-doj, kiuj venos el ĉiuj lokoj de nia lando.

En multaj rondetoj oni jam starigis "Vojaĝ-fonduson", kie la interesuloj ŝparas monon monon por la vojaĝo kaj 4taga restado en Otrokovice. Inter niaj eksterlandaj

gek-doj jam kelkdekoj anoncis sian partoprenon, kaj se kunvenos sufiĉe multaj, ni aranĝos apartan kunvenon (RENKONTIĜON) de MEM-anoj por diskuti ĉiujn gravajn problemojn, rilate nian movadon. Krome estos Internacia Interkonatiĝa Vespero kun libera diskutado ĉe tabloj kun kultura kaj amuza programo, diversaj fakaj kunvenoj ktp . Preskaŭ ĉiuj landaj MEM-perantoj jam antaŭpromesis sian partoprenon. Ankaŭ la vizitontoj de la Junulara Festivalo en Varsovio havos eblecon viziti nin. Apartajn eblecojn kompreneble ĝuos niaj gek-doj el popoldem. landoj, kaj ni ankaŭ esperas, ke tiuj jam de nun klopodos aranĝi kolektivan renkontiĝon okaze de la Spartakiado kun ni. Pri ĉiuj pluaj novaĵoj, rilate nian TUTŜTATAN KONFERENCON, ni de nun regule informos vin per ĉiu n-o de nia landa bulteno "LA PACDEFENDANTO" kaj laŭ eble ankaŭ pere de "PACO".

Rud. BURDA

## ONI HONORIGIS MIN MONDA PORPACA BATALANTO

(Unu el la plej aktivaj MEM-anoj estas nia k-do Antonín FRANTL el urbo OPAVA en Ĉeĥoslovakio. Ni lasu ĉi tie rakonti lin mem:)

.... estas mia devo konatigi vin, kun kiaj sukcesoj finis miaj klopodoj. Unue mi preparis ĉeokazan ekspozicion. Ĝi ampleksis ĉ. 9 m/2 da surfaco. El via materialo mi uzis (MEM-ČSR) 31 bildojn rilatantaj la "Sangan 1. majon en Tokio" kaj bakteriologian militon en Koreio, krom 6 grandaj fotoj pri helpo de Esperanto en Japanio aranĝita ekspozicioj rilate Ĉeĥoslov.

La ekspozicio vekis grandan intereson kaj ĉiuj partoprenantoj de la konferenco rigardis ĝin, multaj tre detale. Post la fino de la packonferenco mi ĝin devis pruntedoni al nia "Domo de Klerigado".

La Packonferenco okaziĝis la 27. de februaro kaj partoprenis 205 delegitoj. Ĉeestis sekretario de la Centra Packomitato, k-do Svárovský, kiu havis la ĉefan paroladon. Ĉe la estrara tablo sidis ankaŭ generalo Spindler, regiona deputito kaj parlamenta deputito k-do Pleskáč.

Sekve de mia instigo, la konferencon atingis du salutleteroj el eksterlando (imagu, se estus plimultaj), de Eriksberga packomitato el Göteberg-Svedio kaj de packomitato el Helsinki-Finlando. Mi devis tuj traduki kaj la leteroj faris sian mision – ili profunde impresis la konferencanojn. La prezid. de nia distrikta packomitato, verkisto Fran Směja en sia jarraporto tre detale priskribis la interŝanĝadon de leteroj interla Eriksberga kaj nia packomitatoj. Li laŭtlegis ĝian 1. leteron kaj nian respondon. Mi kun ankoraŭ du aliaj komitatanoj estis poste publike honorigitaj kiel "MODELAJ PORPACAJ BATALANTOJ". En la diskuto mi mallonge dankis pro la honorigo kaj fine mi solene transdonis al la prezidantaro memorkajeron, kiun sendis donace esp-istoj el universitato de Karolo. La kajero enhavis 21 solidarecesprimojn, kiujn ili ricevis resone al japanaj pacdeklaracioj de diversaj unuopuloj kaj korporacioj el la tuta mondo. Inter ili ankaŭ estis 6 el Ĉeĥoslovakio kaj nia urbo Opava. Lunde la 7. de marto mi prelegis en la uzino "OSTROJ" en Opava, kie ĉeestis ĉ. 100 virinoj.

Estis Internacia Virina Tago. Dimanĉe la 13/3 mi transdonos similan memorkajeron al la Regiona komitato de kontraŭfaŝistaj batalantoj en Ostrava, kie mi verŝajne ankaŭ prelegos pri la efiko de atom- kaj hidrogenbomboj. Krom tio mi atendas inviton al kunveno de Virina Komitato en Ostrava, al kiu mi ankaŭ devos transdoni memorkajeron. La novelektita distrikta komitato de pacdefendantoj en Opava planas ekspozicion en la kastelo HRADEC apud Opava pri "Arto en la servo de paco", kiu devus daŭri la tutan someron komence de la 1. de majo. Estis dirite, ke ankaŭ ni, esperantistaj pacdefendantoj devos ekspozicii niajn materialojn.

Ant. FRANTL

<u>KORESPONDI DEZIRAS</u>:
K-do ČÁŇ Břetislav, Vyškov
K-do ZABLOUDIL Alois, Vyškov
K-dino MASNICOVÁ Věra, OSTRAVA
K-dino ZAKOPČANOVÁ Julie, OSTRAVA
K-do VALA Karel, OSTRAVA
K-do VANĚK Josef, PRAHA
K-do Bor Ang. VELEV, Bulgario
K-do HOKR Petr, PLZEŇ
K-do VOLDŘICH Frant. Horní Dvořiště

<u>NIAJ PERANTOJ:</u>
AŬSTRIO: WAGNER, Fr.
BELGIO, NEDERLANDO: Fr. DEBARNE
BRITIO, IRLANDO, USONO, AŬSTRALIO, Brita Esp-Packomitato
BULGARIO: A. VELEV
ĈEĤOSLOVAKIO: Fr. LIČKA, Ostrava-Zábřeh
DANLANDO: W. NIELSEN
FINNLANDO: Paavo HEIKINEN
FRANCIO, HISPANIO, SVISIO: J. DOUARD
GERMANIO: Helm. LÖFFLER
HUNGARIO: Pál BALKÁNYI
ISLANDO, KANADA: Th. FINNBJARNARSON
ITALIO: Arn. OPISSO
NORVEGIO: Hennig NIELSEN

==========================================================
Eldonis: Závodní klub ROH-odbor ESPERANTO, TATRA n.p. KOPŘIVNICE
Redaktis: K-do Rudolf BURDA, Palackého nám. č. 6, PLZEŇ, ĈEĤOSLOVAK
==========================================================